

Kvin jaroj de laboro ĉe la radio kaj la morto de Charles Ecabert
Claude Gacond, 218-a radioprelego, 1967.12.13 & 1967.12.16

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasinta elsendo signifis por ni la festotagon de kvin jaroj de kunlaboro en la disaŭdigo de esperanta programo ĉe la Svisa Kurtonda Radiostacio.

A.- Tiu kunlaboro, pro la devigo ĉiam alporti ion novan kaj nutrigan al vi, karaj geaŭdantoj, estis por ni pli riĉiga kaj entuziasmiga, ol ni povis unuavide esperi.

Cl.- Bedaŭrinde tiu kunlaboro estis trudita de mallumaj cirkonstancoj. La plej fidelaj kaj malnovaj geaŭdantoj certe memoras pri la voĉoj de niaj antaŭuloj Edmond Privat kaj Charles Ecabert. Pri la tro kurta esperantista kariero de la dua ni volas hodiaŭ paroli.

A.- Charles Ecabert esperantiĝis okaze de la zamenhofa jaro en 1959 dum gravega manifestacio **Esperanto en la lernejo**, kiu disvolviĝis en la gimnazio de lia urbo Neuchâtel.

Cl.- Li estis allogita al tiu manifestacio pro multaj kaŭzoj: unue ĉiuj lingvaj problemoj lin ege interesis; due estis okazo aŭdi du gravajn personecojn: Edmond Privat kaj Pierre Bovet; trie la programo anoncis la ĉeeston de gelernantoj praktikantaj la internacian lingvon en la lernejo, kaj unu el iliaj instruistoj, Michel Frésard, estis parencano nekonata.

A.- Ŝajnis, ke la fato volis konduki Charles Ecabert al esperanto. Kiel vi konstatos, la tempo urĝis.

Cl.- Ni nun lasu lin paroli ĉerpante el lia unua radioprelego prononcita la 18-an de julio 1962, do eĉ ne tri jarojn post tiu unua renkonto kun la esperanta mondo:

A.- Aŭdu liajn dirojn:

Cl.- *En 1960 fakte mi aliĝis al esperanto, ĉeestinte, okaze de la zamenhofa jubileo, regionan kunvenon dum kiu parolis, post Edmond Privat kaj Pierre Bovet, honora direktoro de l'Instituto por Edukscienco, infanoj de du klasoj de nia ĵurasa montaro, kaj juna japana ĵurnalistino Joŝiko Kaĵino. Konstatinte, ke personoj tiel diversaj kaj malproksimaj ĉu per la aĝo, ĉu per la lingvo, sin flue, belsone kaj ĝoje esprimas kaj inter si komprenas, mi konsideris kiel urĝa devo min dediĉi al la lernado de esperanto. Kaj mi konfesas, ke mi neniam bedaŭris tiun penadon, kiu min riĉigis pli ol mi iam esperis. Ĝis tiam miaj atento kaj celado precipe koncentriĝis sur la latinan antikvecon, estante profesoro pri la latina lingvo kaj historio. Sed ekde tiu momento mi havis la impreson vidi la horizonton malfermiĝanta kiel matena krepusko post nokta obskuro kaj rilati kun la hodiaŭa mondo en ĝiaj tuta vasteco kaj vivanteco, kaj mi benas la horon je kiu mi renkontiĝis kun la lingvo kaj movado esperanto. »* (Fino de la citaĵo.)

A.- Post unu jaro kaj en la sama urbo estis reorganizita manifestacio **Esperanto en la lernejo**. Ĝi tiam okazis en la liceo kaj en la klasejo mem de Charles Ecabert, kaj la prelegisto estis li mem. Siajn kolegojn kaj direktorojn li elokvente instigis vidi en esperanto lingvon instruendan en ĉiuj lernejoj, kaj ĉefe en la prilatinaj. La frukto de tiu entuziasmiga prelego estis la malfermo de esperanto-kurso en lia liceo.

Cl.- En printempo 1961 Charles Ecabert akceptis la prezidantecon de Esperanto-Edukistaro de Svislando. Ekde tiu momento li dediĉis ĉiam kreskantan parton de sia apudprofesia laboro al tiu malgranda sed vigla movado. En aŭtuno de la sama jaro dum manifestacio organizita en nia vilaĝo La Sagne pli ol 400 personoj alkuris por aŭskulti la famiĝintan poresperantan latiniston kaj liajn gelernantojn.

Kvin jaroj de laboro ĉe la radio kaj la morto de Charles Ecabert
Claude Gacond, 218-a radioprelego, 1967.12.13 & 1967.12.16

A.- Charles Ecabert estis ŝatata preleganto. Lin invitis kluboj kaj seminarioj. Ekzemple dum la somero 1961 li jam gvidis en esperanto kurson pri la greka humanismo en la kastelo Münchenwiller. Dum tiu somera kultura manifestacio li trapasis kun laŭdo la superan diplomon. En 1962 li prelegis dum la internacia feriosemajno organizita en Oberbalmberg de Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj.

Cl.- Edmond Privat trovis en Charles Ecabert kapablan anstataŭonton por la elsendoj ĉe nia kurtonda radiostacio. Kaj Svisa Esperanto-Societo malkovris en Charles Ecabert lertan redaktoron por la gazeteto *Svisa Espero* kaj prezidonton.

A.- Sed, ho ve ! Nur kelkajn elsendojn li povis prononci kaj nur tri numerojn de nia svisa gazeto li havis la tempon redakti, pro subita malsaniĝo, kiu lin haltigis la 25-an de oktobro 1962. Lia terurigita edzino devis lin transportigi al la hospitalo, kie li kuŝis paralizita dum pli ol sep semajnoj pro virusa malsano nekonata. Malgraŭ la flego de lia edzino kaj de sindonemaj kuracistoj la morto fine lin forrabis, kvazaŭ ĝi ne volis lin lasi disvastigi la zamenhofan lingvon. Kaj ĉio okazis sub la zamenhofa signo. Ĉu li ne estis varbita al la internacia lingvo dum ceremonio dediĉita al la zamenhofa jubileo, kaj ĉu li ne mortis la 15-an de decembro, la zamenhofan tagon !

Cl.- Ni turnas nin hodiaŭ per la radio al lia vidvino kaj du filinoj, kiuj loĝas en Neuchâtel. Ili sciu plian fojon, kiom ni aprezis la personecon kaj afablecon de ilia edzo kaj patro. Kiam la kurtonda servo de la Svisa Radio-Societo min vokis komence de decembro 1962, mi neniam imagis, ke la elsendo por la 28-a de novembro, kiu estis legita de sinjorino Baur, signifis la finon de la fulmo-tondra poresperanta agado de Charles Ecabert.

A.- Se la familio de Charles Ecabert perdis neanstataŭigeblan membron, la svisa esperantomovado same estis senkapigita de neforgesebla ano.

Cl.- La forpasoj de Edmond Privat kaj Charles Ecabert la saman jaron estis troaj pro la svisa samideanaro. Kiel sekretario de Esperanto-Edukistaro de Svislando mi subite heredis pli da laboro, ol estis al mi eble plenumi, kaj nun, post kvin jaroj, nia svisa movado ne ankoraŭ kapablis ŝtopi la breĉon malfermitan de la tro subita foriro de Charles Ecabert, la prezidonto de Svisa Esperanto-Societo.

A.- Memore al nia antaŭulo dum la venontaj semajnoj ni rediros kelkajn liajn radioprelegojn, kiuj estis dediĉitaj al svisaj famaj edukistoj. Aŭdante tiujn tekstojn vi komprenos, kiom grava estis por Esperantujo la morto de Charles Ecabert.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-